

RĈA OKCIDENTO MALSANAS

Britujo ne havas por maljunuloj lokon. Ŝokigan raporton publikigis garanto pri sano ĉe brita registaro pri situacio en britaj hospitaloj, kie miloj da maljunuloj estas lasitaj malpuraj, malsataj, sen prizorgo kaj rimedoj kontraŭ doloroj. „Independent“ raportas pri „senhomeca socio“ kaj „Daily Mail“ pri krueleco, kiu metas honton sur civilizitan ŝtaton, dum „Telegraph“ titolis sian artikolon: „En granda socio ne estas loko por maljuna generacio“.

Sed tio ne estas ĉio: Nacia statistika ofico disponigis raporton, ke en la jaroj 2005-2009 mortis en britaj maljunulejoj (hospicoj) 650 maljunuloj pro dehidratigo (manko de trinkaĵoj) kaj 157 pro nesufiĉa nutrado. Duncan-Jordan el nacia asocio de pensiuloj skribas en „Daily Mail“, ke kvankam la loĝado en hospicoj por maljunuloj estas tre multekosta, „neniu tie helpas vin manĝigi kaj ne prizorgos por vi sufiĉe da trinkaĵoj“.

Tiu ĉi tute nesufiĉa flegado estas skandala, sed ne neatendata: ĝi harmonias kun aliaj raportoj el brita parlamento pri malbonkvalita zorgado pri psike malsanaj. „Lancet“ publikigis jam en junio 2008, ke mensmalsanuloj estas por nacia sansistemo en Britujo „nevideblaj“. Ju malpli iu kapablas pri si doni signon, des pli malbona estas la zorgo, kiun li aŭ ŝi povas ĝisatendi.

Inspekcio en pliaj okcidentaj landoj pruvis: plejparto de kuracistoj opinias, ke la vivo kun neurologia difekto ankaŭ kun fizika handikapo estas pli malbona ol morto, kiel publikigis *Journal of the American Medical Association* en la jaro 2000.

Ĝi estas signo de kultura vundo, de profunda morala dekadenco, se nekapableco estas konsiderata ne kiel io, kion oni devas superi, sed kiel io, kio estas neeltenebla, al kio oni tenas naŭzon, sed ne kompaton. La naŭzo rilate al senpovulo havas du vangojn: unua, kiu ĝis nun validis, kaj la dua, kiam oni ĝisnaŭze parolas pri la morto kaj pri

tio, kiel ebligi morti, kvazaŭ ĝuste tio estus problemo de senpovuloj kaj maljunuloj.

En ĉiuj landoj inkluzive de Italio estas la situacio tia, ke oni ne serĉas solvojn, kiel pli bone vivi, sed malon, oni serĉas diversajn strategiojn de la morto. Kvazaŭ la malamiko ne estas forlasiteco, sed supozata kolero, ke oni vin volas teni vivantan. La gazetaro skribas pri eŭtanazio, kiel garantii finon de la vivo, kiel superi timon el diversaj vojoj kondukantaj al la morto. Anstataŭ zorgado, kiel trovi socion kaj akompanion, oni ofertas diversajn vojojn al la morto.

Ne estas mirinde, ke en tiu ĉi kultura klimato malfermis diversaj francaj hospitaloj pordojn al diversaj kompanioj subtenantaj eŭtanazion, por ke ili povu kontakti pacientojn, kaj tion eĉ spite de protestoj de psikologoj, kiuj atentigas pri risko trakti tiujn ĉi aferojn kun homoj afektive labilaj.

Problemo de digna morto ne baziĝas en tio, kiel ĝin plirapidigi, sed kiel superi doloron kaj solecon. Male al tio estiĝis science disvastigita klimato pri supozata senpacienco kaj kolero de la malsanulo, ke li aŭ ŝi devas esti konservita ĉe la vivo. Ĝi estas rekte teroro, kiu eliras el bazo de tiu ĉi socio. Kiel skribas Cass R. Sunstein, konsilanto de prezidento Obama, en libro *Rajto je Timo*, la homestulo estas tiel superŝutita de timo, ke se li aŭ ŝi renkontas kun iuj sciigoj kaj propagando, ne plu ili okupiĝas pri reala probablo, ĉu la afero fakte okazos, kvankam ĝi estas minimuma, sed sin ĵetas en malegala batalon, por ĝin eviti.

Elkreskas generacio de nespertaj personuloj, kiuj kapablas nur serĉi vojojn, kiel sin defendi, kiel forkuri en kaŝejon, kaj vidas en la morto lastan malesperan konsolon, ĉar la vivo esence perdis allogan sencon. Kaj tial iĝas logika ne investi en pli bonan flegadon, kiu estas „neutila“, sed serĉi strategion de „foriro“ el la vivo, kiu iĝis rekta obstaklo.

Forlasiteco de maljunaj homoj sur la

unuaj paĝoj de britaj taggazetoj ne estas problemoj de nesufiĉeco de la sanitara zorgo, sed ĝi estas kultura kolapso de la rilatoj koncerne la malsanulon, kiu, ĝis kiam li vivas, restas neforviŝebla bildo de la homa reciproka dependeco, certeco, ke neniu vivo estas neutila, eĉ ne se ĝi ne plu estas produktiva. Sed ĝi estas ideo, kiun ne ŝatas tiu, kiu heroldas kulton de „dignoplena“ vivo nur en certaj kondiĉoj de sendependeco kaj sano.

Cetere estas vero, ke kun la malsanulo

estadas problemoj: sed la problemoj estas ankaŭ kun tia sanitara laboranto, kiu ne kapablas porti rilaton kun subtila persono, ĉar li aŭ ŝi al li malagrable memorigas propran subtilecon. Por ke ni povu flegi la malsanulon, tiucele estas necese esti fortaj. Kaj estigi rilatojn, sed ne tiel, kiel oni tion praktikas nuntempe, kiam ni povas parafrazi eldiraĵon de Tacito, ke estiĝas lasiteco, kiun oni nomas libereco. ■

L'Osservatore Romano 20.2.2011